KomACE 2023/18 24/09/2023
==============================================================
KOMUNIKOJ DE AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA (KomACE)
--------------------------------------------------
REDAKCIO : AFRIKA CENTRO ESPERANTISTA
redaktanto : Dr Parfait SIM
Adreso helikposhta : p/a 11.BP.48 Lome 11, Lome, TOGOLANDO
rete : afrikacentro@..., ace2006hb@...
--------------------------------------------------
La informojn en KomACE chiuj rajtas chiel ajn uzi
nur kun indiko de la fonto
==============================================================

Estimataj geamikoj,

Certe vi legis pri VIVEJO, kiu estas la esenco de Esperanto-renkontighoj proponata de ACE en augusto 2023. VIVEJO do konsistas el tri chefaj partoj : palavrejo, lernotempo kaj kunmangho en koucheca (vivtrejneca) etoso. Eble iuj ne scias, kiuj estas la FEOJ de ACE. Pri ili temas en tiu chi KomACE numero 18. Krome oni memoros ankau la diversajn premiojn kaj verkadon de artikoloj por diversaj periodajhoj kaj chefe por la retpagho "uea.facila".
ACE chiam estas je chies dispono por la lernado kaj uzado de Esperanto en chiuj kampoj de homa agado.

## 1- ILI ESTIS, PLUESTAS KAJ CERTE ESTOS
=====================================
En 1983-84 ili estis kune lernante Esperanton. Jes, antau tiam ili estis, sed ne en la Esperanto-movado. Chu tiu iama kunesteco igas, ke nun ili pluestas preskau chiam kune ? Eble ni plulegu kaj certe io aperos.

En 1986 ili kune estis kiam relanchighis la klubo NOVA SENTO en Lomeo, Togolando. EN 1987 kiam kreighis la landa asocio UTE (Unuigho Togolanda por Esperanto), ili kune estis. Che la enoficigo de UTE kiel Unesko-asocio en Togolando, il kune estis. Jes, ili chiam kune estis kaj pluestas.

Jen plia kunestado ilia :
Dum la unua Togolanda Esperanto-Kongreso en marto 1990 kaj dum la unua AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) en Notse en decembro 1990, jes ankau dum la 2a, 3a kaj 6a AKE. Tiel kune ili estas ghis nun, kaj ankau en TIETo (TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando). En 1989, Hemmo TIETTI donacis ion al unu, kaj tiam, li diris, ke li donu similan ion al la alia, kaj tiel li faris. Jes, ili chiam estas kune dum multaj aferoj koncerne edukadon/lernadon/instruado. Nenio malhelpis ke ili kune estis ankau dum la starigado de Instituto ZAMENHOF. Jes, preskau chiam, en multaj rondoj kaj medioj, ili kune estas
Pri kiuj temas ?

La 16an de septembro 2023 okazis la festo pri la celebrado de la 19-jarigho de IZo kaj lanchado de la laboroj de la klubo NEF (Nova Esperanto-Familio). Ambau pluaperis tie. Jes, tiel estis triopo. Okazas ofte, ke tria persono aldonighas al ili por la gvidado de laboroj. Kiam tria persono forlasas ilin, ili plurestas du ghis plia tria persono aldonighas. Ekde 1993 kvara persono aldonighis al tiama triopo en kiu ili ambau pluestis. Chirkau la jaro 2003 malaperis unu en la kvaropo kaj restis tri. Iom poste aldonighis kvara kaj tie naskighis alia kvaropo. Pluestas tiuj du, kaj finfine nun estas tri, el

kiuj la chiama DU pluestas. Kion rekonindu, tio estas, ke tiuj homoj estas la "feoj" de la tuta laboro esperantista en Togolando, kio efikas ankau por la movado afrika.

La 21an de septembro 2023, s-roj ATTIOGBE-AGBEMADON Biova Mensah kaj SAGBADJELOU Kokou vizitis Instituton ZAMENHOF kiel pedagogiaj konsilantoj. Tiam ili interkonsilighis kun la geinstruistoj pro la preparlaboroj koncerne la ekon de la nova lernojaro 2023-24 en Togolando. Tiuj du personoj interkonsilghis kun GBEGLO Koffi pri diversaj aferoj. Temis pri tute neantauvidita kunveno. Tamen gravaj punktoj aperis dum la diskuto.

Nun notighas la ne vigla funkciado de landaj asocioj en Afriko kaj aparte en Togolando. Tiu chi punkto ne povis ne aperi tra iliaj vortoj. Kio rimarkighis tiam ?
Jes, chio okazas nun en Afriko, kvankam Esperanto shuldas ion al afrikaj esperantistoj. Kiam iuj eklernas Esperanton, tuj ili petas diversajn aferojn de la homoj kiuj al ili instruas Esperanton. Chio montrighas, kvazau la eklernantoj rajtas ricevi ion donacan pro la lernado de Esperanto. Ne nur che la komencantoj oni rimarkas tion, sed ankau che esperantistoj malnovaj, kiuj ech prunteprenas monon de siaj instruintoj kaj rifuzas repagi. Ili postulas aferojn vere strangajn, kio demandigis s-rojn ATTTIOGBE-AGBEMADON Biova Mensah kaj GBEGLO Koffi. Ili pripensas, demandas sin. En nia Esperanto-agado, kion ni elektu inter ?
- "Esperanto devas ion fari por mi" KAJ "mi devas ion fari por Esperanto" ?
- "Esperanto bezonas homojn ( ankau esperantistojn) KAJ "Esperanton bezonas homoj (ankau esperantistoj).

S-roj Mensah kaj Koffi klopodis respondi la demandojn kun la helpo de s-ro SAGBADJELOU Kokou. Ili tiel trovis du eraojn en la Esperanto movado afrika. La unua dum, kiu afrikaj esperantistoj pensas, ke Esperanto faru ion al ili au Esperanto bezonas ilin kaj la alia erao, dum kiu ili faru ion por Esperanto au ili bezonas Esperanton.

La unua periodo estis kaj pluestas nun. Tio estas la tuta problemo de Esperanto en Afriko. Esperantistoj afrikaj chiam postulas, ke Esperanto faru ne nur ion, sed chion al/por ili, dum ili mem apenau ion egalan faras al Esperanto. La triopo de la 21a de septembro 2023 venas al la nuna konkludo :
Por bela estonteco de la afrika movado, necesas, ke jam nun esperantistoj alpashu la duan eraon, en kiu ankau afrikaj esperantistoj klopodu fari ion por Esperanto multe pli ol ili atendas, ke Esperanto faru al ili. Ne ilin bezonu Esperanto sed Ili bezonas Esperanton. Tiel ili devas bone lerni la lingvon kaj poste uzi en chiuj kampoj de la homa agado kaj por atingi chiujn celojn honestajn kaj dignajn por la evoluo de la homaro. Chiterene ili havas devojn.

Esperantistoj afrikaj, grupe au unuopule, klopodu memstare agadi antau ol esperi ielan subtenon eksteran. Ech se devas veni ekstera helpo, ili klopodu ke
- La helpo helpu, ke ankau ili helpu la aliajn
- Tiu helpo aldonighu al io, kion ili mem faras proprarimede.
Tial la alvoko de tiuj tri togolandaj esperantistoj al siaj samlandanoj/samkontinentanoj estas, ke ili klopodu, ke
1- La landa asocio kaj klubo estu rekonita de la naciaj instancoj
2- la landa asocio funkciu surbaze de reguloj tre klaraj kaj respektataj de chiuj
3- La landa aoscio funkciu per rimedoj, kiujn la membroj disponigas al ghi.
4- La havajhoj de la landa asocio estu bone administrataj lau la reguloj de la landa asocio.

Duopo, triopo, kvaropo kaj ktp-opo gravas por la funkciado de grupo. Kio gravas, tio estas, ke la elementoj de la grupo sin komprenu tre bone kaj ke chiu el la elementoj estu responsema, kio estas, ke ili pretu oferi sin por la vera bono de la grupo. En tio ili pretu uzi ankau proprajn rimedojn atendante nenian profiton au rekompencon. Du el la opoj, kiuj pluestas en la togolanda movado

estas s-ro ATTIOGBE-AGBEMADON Biova Mensah kaj GBEGLO Koffi, kiuj pliafoje jhus enprofundighis en la reviglig on de la landa asocio UTE en Togolando kun la sindedicha kontribuo de s-ro SAGBADJELOU Kokou. La propono farita de la diskuto de la 21a de septembro 2023 baldau aperigos ion.

2- Verku artikolojn por la retpagho "uea.facila"
==================================================

Unu el la rapida uzado de Esperanto estas verkado de artikoloj por periodajhoj. Tial en Esperanto multas la periodajhoj por chiu ajn kategorio de homoj. Tiuj periodajhoj bezonas artikolojn de chiuj, kaj ACE elektos artikolojn en tiuj periodajhoj por aljughi premiojn al verkintoj de tiuj tekstoj temantaj pri ASPEKTOJ DE LA VIVO EN AFRIKO. Pri la premioj aperas vortoj sube. Necesas montri lokon kie ACE plejofte legas artikolojn. Tio estas la retpagho "uea.facila". Kiuj shatus verki artikolojn por ghi, tiuj devas scii ion. Vidu, sube, vortojn de la redaktorino Anna LOWENSTEIN anna.lowenstein@...!

"- Artikoloj en uea.facila estas mallongaj, kun ne pli ol 400 vortoj. Mi petas, ke oni ne sendu pli longajn tekstojn, char mallongigi tro longan artikolon estas granda tasko.
- Artikoloj en uea.facila estas seriozaj, malgrau la simpla lingvajho. La legantoj estas plenkreskuloj, ne infanoj, kaj mi preferas eviti fabelojn pri parolantaj bestoj kaj simile. (Verdire mi akceptis unu tian rakonton lastatempe, sed unu sufichas!)
- Artikoloj estas verkitaj surbaze de la vortlisto. Se aperas vorto, kiu ne estas en la listo, mi aldonos difinon por helpi la legantojn. Eblas kontroli la lingvajhon de la rakonto per Facililo, kiun oni trovas chi tie: https://facilavortaro.org/#/facililo Se oni tajpas la rakonton en tiu fenestro (au engluas jam pretan tekston), oni tuj vidas, kiuj vortoj ne trovighas en la listo.
- Verkante, oni prefere evitu tro malfacilajn frazostrukturojn kaj kunmetaĵojn.

Sed ne tro zorgu pri la vortlisto, char mi mem povos simpligi malfacilan lingvajhon, kaj launecese aldoni difinojn. Redaktinte artikolon mi chiam resendas ghin al la verkinto por aprobo antau ol aperigi ghin. Tio, kion mi ne volas fari, estas mallongigi tro longan tekston. Tio estas tasko de la verkinto, ne de la redaktoro!"

NB: la vortoliston oni rajtas ricevi de la redaktorino Anna LOWENSTEIN : anna.lowenstein@...
au de ACE (Afrika Centro Esperantista) : ace2006hb@...

3- AGNOSKO DE LABOROJ DE ESPERANTISTOJ
========================================

Homoj tra la mondo vere dedichas sin preskau tute al Esperanto. ACE taskas al si disponigi distingilojn al iuj el tiuj homoj. Dum premioj havos nomojn de esperantistoj, aliaj esperantistoj precipe afrikaj havos tiujn premiojn pro laboroj faritaj. ACE disponigas almenau 100 eurojn por chiu premiito.

La diversaj premioj estas :

i- Premio Hans BAKKER
Ghi celas afrikajn esperantistojn plej aktivajn en la instruado de Esperanto en la jaro.

ii- Premio Renato CORSETTI
Renato CORSETTI estas dumviva zorganto pri regiona agado. Tial la premion ricevos la esperantogrupo chefe landa asocio au klubo, kies agado elstaris inter la aliaj en la jaro..

iii- Premio Giorgio SILFER
Giorgio SILFER estas tre talenta Esperantisto ege diligenta. Necesas rekoni tion de li tre admirinda. La premio celas esperantistojn-verkistojn .

iv- Premio Hemmo TIETTI
Jam estas premio Hemmo TIETTI por aktiva esperantisto, kiu tre bone scias ion pri TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando. Povos ech esti konkurso por tio  kaj oni respondos demandojn rilate TIETon.




VESTAĴO
Afrika oficejo